# Esperanto en Danio

25-a jarkolekto • n-ro 2 • majo 2018

103a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO

LISBONO 2018

28 JULIO – 4 AŬGUSTO

**Esperanto en Danio**
membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

**Adreso de la prezidanto:**
Peter Wraae
Eremitageparken 17 st, C
2800 Lyngby
☎ 60 70 79 69 peter@wraae.dk

Ĝirokonto de DEA: 8411-41 88 386

UEA-kodo: deaa-t

**Kromaj estraranoj:**
Finn Østerbæk (kasisto)
Ileana Schrøder (vicprezidanto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Bent Jensenius
Arne Casper

**Redakcia adreso:**
Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

**Presado:**
DDFO

**Adresŝanĝoj al:**
Finn Østerbæk ☎ 24 96 04 45
finnoesterbaek@gmail.com

Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

**15.08.2018**

# Enhavo

**Jarraporto de DEA por la jaro 2017........................................3**
**Protokolaĵo................................11**
**Sukcesa kongreso....................15**

**Ekspozicio.................................16**
**Kopenhago................................17**
**Cetera Danio.............................17**

**Recenzo de du lerniloj.............18**
**Post babilado sekvis agado....20**

**Korespondi deziras..................23**
**Nova esplora centro.................24**
**Bona historieto.........................27**

# Jarraporto de DEA por la jaro 2017



Estas feliĉo por mi kaj la estraro bonvenigi vin ĉi tie. La ĉi-jara jarkunveno estas rezulto de diskuto inter Ann-Louise Åkerlund kaj mi, kiu okazis antaŭ pli ol unu jaro. Ann-Louise relative ofte vizitas nin en Kopenhago kiam okazas ekstraordinaraj renkontiĝoj, kaj dum unu de tiaj aranĝoj ni promenis ĉirkaŭ Damhussøen en Vanløse, kaj dume ni interkonsentis starigi novan tradicion fari komunajn jarkunvenojn ĉiun trian jaron. Komence la plano estis ke la dana kaj sveda movadoj estu kune, sed ni ambaŭ esperis ke la norvegoj ankaŭ partoprenu. Ili feliĉe jesis kvankam ili kutime faras jarkunvenon nur ĉiun duan jaron, kaj ne ĉi-jare.

Mi ĵus pensiiĝis kaj tial ne havis tempon respondeci pri la ĉi-jara jarkunveno, Mia laboro okupis min multe, dum multaj periodoj eĉ tro, sed laŭ interkonsento kun Ann-Louise, ŝi respondecas pri la ĉi jara Trilanda Jarkunveno, kaj mi pri la venonta en 2021. Kaj ni kompreneble esperas ke la norvegoj ankaŭ volos partopreni.

Fine de aprilo Emilio Cid, estrarano de UEA, vizitis Danion. Pere de nova apo Amikumu li facile trovis nin, kaj restis kelkajn tagojn kune kun sia edzino. Ilia celo, krom viziti esperantistojn, estis ŝerĉi informon pri familianoj de la edzino, kiu havas malproksimajn rilatojn kun Danio.

Mi ŝoforis ilin al la kastelo Kronborg kiun ili ĝuis, Ileana Schrøder invitis nin vespermanĝi, kaj alian vesperon membroj de DEA invitis ilin vespermanĝi en restoracio RizRaz.

Ili devis forvojaĝi la unuan de majo vespere, kaj Emilio volis viziti nian budon en Fællesparken. Li feliĉe venis, ĉar ni vere havis malfacilaĵojn. Forta vento blovis kaj Bent Jensenius, Finn Østerbæk kaj mi provis starigi tenton, kio estis malfacila procezo, ĉar ni estis tri homoj kaj la tento havas kvar stangojn. Tio signifis ke, por aliaj homoj kiuj rigardis nin, certe estis amuza procezo – kiel vidi filmon de Charlie Chaplin. Do, post la alveno de Emilio ni supervenkis la situacion, kaj sukcesis starigi la tendon.

La okazaĵo kiu vere ĝojigis la estraron de DEA estis, ke DEJO reaperis de ĝia dorma stato. Mia Nordentoft kuraĝe prenis respondecon kaj ni en DEA deziras al vi ĉion bonan. Vi ĉiam povas turni vin al ni, se vi bezonas helpon.

Nia hejmpaĝo havis dum la lastaj jaroj konfuzan vivon. Ĝi subite detruiĝis, kaj feliĉe mia pli aĝa filo povis starigi novan. Iom post ĝia reapero, Ileana Schrøder diskutis la temon kun Mia Nordentoft, fari finan pli altnivelan solvon, kiun ŝi bone sukcesis. Nun nia hejmpaĝo estas tre profesie farita, kaj mi ricevis etan kurson de Mia kiamaniere fari simplajn ŝanĝojn. Estas mia plano uzi pli da tempo en tiu kampo estontece.

Do, dankegon al vi Mia por via tre granda laboro !

Betty Catterjee bone zorgas pri la fejsbuka paĝo de "Dana Esperanto Asocio" kiu nun havas 350 membrojn, 50 pli ol lastjare. Dankon al vi Betty por tiu laboro.

La gazetaro estis dum la pasinta jaro tre donacema. Mi skribis al Politiken kronikon pri nia lingvo, kaj ili akceptis ĝin, Tio vere plaĉis al mi, ĉar ties kronikoj estas vaste legataj. Poste, ĵurnalisto kiu nomiĝas Casper Hindse, kontaktis min kaj petis intervjuon. Li laboras en ĵurnalista agentejo kiu skribas pli profundajn artikolojn por la dana gazetaro. Li telefone intervjuis min, kaj skribis artikolojn por Nordjyske (kiu kovras Vendsyssel kaj Himmerland), Skive Folkeblad kaj ĉiuj gazetoj en Selando.

Nia tradicia Zamenhofa festo okazis en bona etoso. Kelkaj kontribuis kun distraĵoj, Betty Catterjee rakontis historion, Ana Røssum faris tre amuzan skeĉon. Dankon al ĉiuj kiuj kontribuis. Mankis al ni muzikistoj, kaj antaŭ la venonta festo, ni devas inviti ilin pli frue.

Libroservo: bedaurinde pri la libroservo ni konstatas, ke dum la lastaj jaroj la vendado de libroj stagnis, eble pro la fakto ke nun estas pli facile aĉeti librojn rekte de UEA, kaj eble pro la aliro al aliaj interretaj eblecoj por la legantoj. Cetere Ileana Schrøder alprenis la taskon gvidi la Libroservon ekde 2018.

## Eksteraj Rilatoj

*Raportas Ileana Schrøder.*

Ni daŭre estas membro de la reprezenta komitato de la UN-Asocio, membras en KUKS, la ombrela asocio de danaj kaj alilandaj kulturaj asocioj, de la neregistara organizo de Baltaj Landoj kaj de la Ministerio de Paco (Fredsministeriet), ombrela organizo de asocioj de la pacmovado. Tiu estas grava tasko por esti videblaj ekster niaj esperantaj rondoj.

Mi aparte povas mencii ke niaj membroj havas plezuron partopreni la

aranĝon de KUKS, kiu ĉiujare festas la tagon de Unuiĝintaj Nacioj la 24-an de oktobro en la urbodomo de Kopenhago. KUKS invitas la membrojn de la aliĝintaj asocioj al kultura programo kun partopreno de alilandaj ambasadoj, kiuj ofte partoprenas kun bufedoj kun pladoj de siaj landoj. Kelkajn jarojn oni aranĝas ekspozicion kiel ekzemple en 2018, kiam la titolo de la ekspozicio estos la naciaj parkoj.

## Jarraportoj de la lokaj kluboj

### *KEK – Kopenhaga Esperanto Klubo 2017*

*Raportas Bent Jensenius*

KEK fondiĝis en januaro en la jaro 1908. Baldaŭ poste ili preparis la alvenon de Zamenhof la saman jaron. Betty ekhavis la bonan ideon fari piediran promenadon ”en la piedspuroj de Zamenhof”. Ni jam faris tiun ekskurson plurfoje kaj dum la venonta DEA-jarkunveno ĉi-jare ni refaros ĝin ankaŭ por niaj gastoj de Svedio kaj Norvegio.

Je la fino de 2017 estis 34 membroj de KEK, inter ili du dumvivaj membroj.

Reklamo: En 2017 ni havis budojn en Fælledparken kaj Krop, Sind og Ånd. Malgrau la malmultaj budoj kaj malmultaj novaj lernantoj, kelkaj personoj, kiuj eklernis Esperanton en la reto, precipe Duolingo, kontaktis nin kaj vizitis nin en la klubo dum ja jaro.

Dum 2017 estis pluraj eksterklubejaj aranĝoj:

- PARALELA UNIVERSO en Norda kaj Suda Ameriko, Bern, Moskvo kaj Kopenhago. Ni ŝanghis la programojn pro malbona veterprognozo. Fakte la vetero estis sunbrila. La venonta Paralela Universo okazos 18-an de augusto, 2018. Eble ĉi-jare pliaj urboj partoprenos. La hejmpaĝo de la aranĝo estas https://paralelauniverso.com/
- Komuna manĝado en Rizraz (tamen ne vera KEK-aranĝo) kun Ana Löwenstein kaj sia filo Fabiano
- La jam menciita ”En la piedspuroj de Zamenhof”
- Japana filmo Plena Rondo pri Esperanto. Ĝi estas aĉetebla surrete sed ni atendas ĝis ĝi haveblos kun esperantaj subtitoloj. (La filmo estis parto de anglalingva artevento).

- Ni ankau havis eksterlandajn gastojn en la klubejo:

  Franca biciklista paro kiuj vojaĝas ĉirkaŭ la mondo.

  Andy Rosenbaum el Boston. Tio donis la eblecon lastmomente aranĝi komunan manĝadon surloke.

  Baard Hekland el Norvegio kies filo estis en la Rigshospitalet.
- Iun sabaton Peter Weide gvidis gramatikan kurson kaj poste ni kune manĝis en apuda restoracio Behov.

Ni havis Zamenhoffeston kiel kutime.

Inter la specialaj programerojn en niaj kunvenoj ĉiuj lundoj vesperoj estas:

- Studgrupo: ni legas ĉapitron in la libro Paŝo al plena posedo de William Auld, kiu estas alirebla en la reto.
- Mia esperanto-vivo: Svend Friis Jørgensen, Svend Ziegler, Eliza Kehlet, Jan kaj Lene Niemann, kaj la lasta viktimo ĝis nun Erik Mortensen kune kun Jan Niemann (la 30-an de aprilo ĉi-jare).
- Danlingva prelego: Ole Stig Andersen, la iama redaktoro de la reta Sprog Museum.
- VIKIPEDIO: Kelkaj personoj faris kaj daŭre faras artikolojn por enmeti en la esperantan Vikipedion. Ni ĉefe elektas vidindaĵojn en Kopenhago. Kun la nova teknologio eksterlandaj turistoj povas stari ĉe statuo, fonfano, ktp. kaj kun sia iPhone au saĝtelefono gugli la koncernan artikolon.

***Raporto de Aalborg Esperanto Klubo 2017***

*Raportas Ejnar Hjort.*

En 2017 ni estis 18 membroj kaj 1 subtenantoj.

Dum la ekspozicio en Aalborghallen, ni denove disdonis pli ol 500 ekzemplerojn de informiloj pri esperanto kaj kun reklamo por Duolingo kaj kun telefono kaj adreso, por kurso de esperanto en Aalborg. Tamen en 2017 ni ne fondis novan kurson por komencantoj. Sed ni daŭrigas partopreni ekspozicion en Aalborghallen.

Kvar klubanoj havis okazon esti en Svislando unu semajno por la ILEI-seminario en Les Brennets.

Nia klubaktiveco estas preskaŭ nur ekspozocioj kaj kursoj. Ni havas 2 kursojn en du niveloj, merkrede.

Mi ripetadas, ke la plej grava afero por ni kaj por la kluboj estas informi pri esperanto kaj oferti instruadon. Se ni ne faras tion, la kluboj mortos.

Nia jara kotizo estis sama kiel en la antaŭa jaro.

La membroj de la estraro estis:

Prezidando: Ejnar Hjorth

Kasisto: Karen Jørgensen

Sekretario Annette Holck

Revizisto: Anni Nielsen

Anstataŭanto: Randi Jensen

***Raporto de Aarhus Esperanto-klub 2017***

*Raportas Grete Kvist.*

La jaro 2017 estas malfacila jaro por la klubo, ĉefe pro la perdo de nia prezidanto dum 20 jaroj, Stanislaw Mielczarek. Dum tiu jaro forpasis ankaŭ iama prezidanto Gunhild Halager. Feliĉe alvenis nova membro, Svend Vendelbo Nielsen. La klubo havas nun 23 membrojn. Ni daŭre kunvenas en Folkestedet, Carl Blochs Gade 28, 8000 Aarhus C. La kunvenejo estas komunuma kaj senpaga, escepte de pago por enirkartoj.

Kiel kutime en januaro la temo de la kunveno estis ”Kia estis la jaro 2016 kaj kion vi atendas de la nova 2017-a jaro?”. Montriĝis ke la atendoj de Stanislaw ne estis bonaj, ĉar lia kancera malsano bedaŭrinde revenis en eĉ pli severa formo ol antaŭe.

En februaro okazis Ĝenerala kunveno. Ni sukcesis konvinki Stanislaw reelektiĝi kiel prezidanto, malgraŭ sia malsano, sed li diris: "Tio estos mia lasta periodo". Pri tio li ja bedaŭrinde pravis. Ni decidis pligrandigi la estraron por havi sufiĉe da laborfortoj.

La estraro konsistis el: Stanisław Mielczarek – prezidanto, Grethe Kvist – kasisto, Tove Bak, Marie Holdt, Byrial Jensen, Mia Nordentoft, Tobias Nowak kaj Bodil Shah (anstataŭanto).

En la estraron de Fonduso de Betty Jensen ni elektis: Stanisław Mielczarek, Grethe Kvist, Tove Bak kaj Marie Holdt (anstataŭanto).

Revizoroj: Azhar Shah, Eckhard Bick kaj Tove Jyding (anstataŭanto).

En marto Grethe Kvist kaj Erik Hjorth rakontis pri: Kanado de oriento al okcidento per trajno – impresoj de nia vojaĝo en junio 2016.

En aprilo la planita temo estis la 100-jara datreveno de la morto de L.L. Zamenhof. Bedaŭrinde la kunveno ne okazis pro malsano kaj manko de partoprenantoj.

En majo Tobias rakontis pri Dubajo, kien li vojaĝis por viziti sian patron.

La Somera ekskurso 2017 okazis la 12-an de aŭgusto. Tove Bak kaj aliaj sudjutlandanoj invitis nin al Kolding. Ni estis 20 partoprenantoj. Ni vizitis Harteværket, antaŭe akvoenergia centralo, nun muzeo, kie ni ankaŭ manĝis nian kunportitan lunĉon. Poste ni daŭrigis al la Geografia ĝardeno kaj la miniatura urbeto de Kolding. Bedaŭrinde pluvis, do ni ne restis longe. Ni finis la ekskurson ĉe Tove per komuna teo- kaj kafotrinkado kun kukoj. La etoso estis bona.

La 26-an de aŭgusto Stanislaw kun Tobias iris al la aarhusa radiostudio de Dana Radio por esti intervjuitaj okaze de la 130a datreveno de la eldono de la unua Esperanto-lernolibro. Jen la ligilo al la programo:
https://www.dr.dk/radio/p1/p1-eftermiddag/p1-eftermiddag-2017-07-26

La unua kunveno en septembro kiel kutime temis pri niaj somerferiaj travivaĵoj. Poste ni iom diskutis la estontecon de la Betty Jensen-fonduso, kiu pro novaj registaraj (danaj kaj eŭropuniaj) postuloj ne povas resti kia ĝi estas. La fonduso jam dum jaroj estas tiom malgranda, ke ĝi ne plu estas jura fonduso. Pro la malalta renta nivelo la enspezoj daŭre malkreskas. Inverse la administraj kostoj ekde 2018 draste pligrandiĝos pro nova EU-regulo, kiu malebligos al firmaoj kaj asocioj vendi kaj aĉeti valorpaperojn sen LEI-kodo, kiu kostos minimume 1.000 kronojn ĉiujare. Ni venis al la konkludo, ke la plej bona solvo estas komenci malfondan proceson, t.e. voki al eksterordinara ĝenerala kunveno.

La oktobra kunveno sekve havis du punktojn: La prelegeto de Tobias pri kurso en Slovakio, kiun li partoprenis kun Mia kaj du aliaj danaj esperantistoj, kaj la eksterordinara ĝenerala kunveno. Necesis partopreno de 2/3 de la membroj por ke la kunveno estu decidopova. Tio eblis nur per voĉdonrajtigiloj de pluraj membroj, interalie de Stanislaw, kiu estis en la

lasta fazo de sia malsano. La propono pri malfondo de la Betty Jensen-fonduso estis akceptita.

Du tagojn poste, vespere la 29-an de oktobro, Stanislaw mortis. La saman tagon kvin membroj de ÅEF ekskursis kun slovakaj esperantistoj, kiuj vizitis Danion por supreniri al ĝia “plej alta punkto” (jen ligilo: http://www.poludnica.esperanto.sk/). Stranga penso ke ni ekskursis dum Stanislaw estas mortanta, tamen li verŝajne dezirus, ke ni kaptu la okazon renkonti eksterlandajn esperantistojn. Sabate la 4-an de novembro okazis la funebra ceremonio en la katolika preĝejo de Århus. Kvin membroj de ÅEF partoprenis ĝin.

En novembro Mia rakontis ankaŭ pri la kurso en Slovakio kaj pri sia vojaĝo al Hungario. Poste ni havis mallongan estrarkunsidon por disdoni la plej urĝajn taskojn. Tobias respondecas pri la kontakto al Folkestedet kaj Mia estas kontaktpersono por la retejoj www.esperantoiaarhus.dk kaj www.esperanto.dk.

En decembro okazis Zamenhof-tago, kiun ni ĉi-jare dediĉis al la memoro de Stanislaw. Partoprenis 12 personoj, interalie Henryka kun du el siaj filoj, Thomas kaj Petro. Ni ĉiuj rakontis pri niaj memoroj pri Stanislaw. Kiel kutime la vespero havas ankaŭ kristnaskan flankon. Ni kantis kelkajn kristnaskajn kantojn en Esperanto kaj manĝis/trinkis tradicie jule benjetojn kaj glogon.

Estis malfacila kaj malgaja jaro, sed nun ni rigardu antaŭen kaj kune laboru por bonaj klubaj aktivecoj en 2018.

Nome de la estraro, Grethe Kvist, januaro 2018.

## *Jarraporto de DEJO 2017*

*Raportas Mia Norentoft.*

Mi transprenis la prezidentecon de Filippo Botta en aprilo 2017 kaj ekde tiam penas revigligi la organizon el ĝia bedaŭrinda dormanta stato. Dum tiu tempo aperis nova retejo (dejo.dk) kaj venis du novaj membroj. La organizo bedaŭrinde ankoraŭ havas nek estraron nek ĝeneralkunvenon pro tro malgranda membrokvanto.

DEJO same ekhavis konton en Twitter (@DEJOEsperanto), kiu funkcias kiel bona ilo por enkontaktiĝi kun junuloj. Mi esperas, ke ankaŭ en la nova jaro venos de tiu flanko novaj membroj.

Kadre de TEJO, DEJO aliĝis al pluraj projektoj, kiuj, se aprobitaj, espereble donos al la organizo multe pli da forto en la estonteco.

Nome de DEJO mi aktivis pri pluraj teknologiaj projektoj, kiuj esPereble plifortigos la retan ĉeeston de DEJO. Ili estas interalie: Dana versio de la plurlingva poŝtelefona aplikaĵo por trovi apudajn Esperantistojn, Amikumu; dana versio de la kurso “Esperanto på 12 dage” (learn.esperanto.com/da), kiu estas komputila eldono de la Zagreba metodo; dana versio de la nova esperanto.net (esperanto.net/da); kiel antaŭe menciite la nova retejo dejo.dk.

En decembro mi persone kune kun Ana Røssum partoprenis programon en DR1 ĉe DR-byen en Kopenhago por prezenti Esperanton. Tiu programo estos elsendita dum la printempo en 2018 (mi supozas, ke ĉirkaŭ en aprilo laŭ tio kion mi trovis).

Entute, la jaro 2017 estis tre bona jaro por DEJO.



## Protokolaĵo

**de Jara Asembleo de DEA 218 kadre de la 2-a Skandinava Kongreso, ĵaŭdon la 10-an de majo 2018 en DFDS-pramo survoje al Oslo**

**1. Elekto de kunvena gvidanto** – Grethe Kvist

**2. Elekto de protokolanto** – Betty Chatterjee

**3. Jarraportoj de DEA kaj la kluboj**

DEA: Prezidanto Peter Wraae enkondukas la prezentadon informante, ke la ideo de la Skandinava Kongreso naskiĝis pro la interkonsento de Ann-Louise Åkerlund kaj li dum iama KEK-a renkontiĝo ĉe Ana Røssum. Laŭ dana kaj sveda interkonsento oni intencos starigi Skandinavan Kongreson ĉiun 3-an jaron.

En 2017 DEA havis 126 membrojn. Dum la jaro DEJO reviviĝis. Pro la malfacilaĵoj hejmpaĝaj Mia Nordentoft faris novan kaj bonan hejmpaĝon. Betty Chatterjee daŭre prizorgas la fejsbukan paĝon de DEA. Post la apero de lia artikolo en Politiken, ĵurnalisto kontaktis Peter Wraae kaj aperis artikolo en jutlanda gazeto. Pro la aktivado de Ileana Schrøder en la asocio KUK niaj membroj kontraŭ modesta pago povas partopreni KUK-an aranĝon la 24-an de oktobro (UN-tago).

KEK: 34 membroj inklusive 2 dumvivaj. Oni ankoraŭ renkontiĝos ĉiujn lundojn.

Aalborg: Prezidanto Ejner Hjort prezentis la raporton. En Aalborg estas 18 membroj inkluzive 7 lernantojn. Oni publike informadas pri Esperanto, sed malmultaj kaptas la ŝancon lerni la lingvon.

Aarhus: Grethe Kvist verkis kaj Tobias prezentis la raporton. 25 membroj. Pro la forpaso de la multjara prezidanto Stanislaw Mielczarek. Grethe memorigis nin pri la fidela agado de Stanislaw ĝis la tago de sia morto en oktobro 2017. La nova prezidanto estas Tobias Nowak.

Post la prezentadoj oni mallonge pridiskutis la defion kiel allogi novajn adeptojn al la movado.Oni ĝojas pro la alvenado de kelkaj gejunuloj, kiuj lernis la lingvon rete kaj aparte per Duolingo. Grave estas allogi novajn membrojn de la reto.

La 18 ĉeestantoj aprobis la raporton.

**4. Jara kalkulaĵo**

Estis pluso de 2,172 kronoj. La ĉeestantoj sendiskute aprobis la kalkulaĵon.

**5. Laborplano de DEA 2018 – 2019**

La ĉefa celo estos la disvastigado de Esperanto en Danio. Peter planos i.a. fari danlingvajn radioelsendojn kaj prelegojn. Li ankaŭ deziras kontakti la partion Alternativet por instigi al ili pripensi la apogon de Esperanto.

Spite al la informo en la protokolaĵo de 2017 Jens ankoraŭ pretas esti redaktoro de Esperanto en Danio.

**6. Proponoj**

La estraro proponis ke:

1. Oni faru altigon de la kotizo por geedzaj paroj de 250 al 300 kronoj, por ke estu egalaj kotizoj kaj en DEA kaj en KEK. Oni apogis la proponon.
2. Oni aldonu al paragrafo 2.2.8 la vortojn: tenado de libroservo tiel longe kiel eblas. La libroservo ne funkcias. Laŭ la kalkulaĵo en la jaro 2017 oni nur enspezis 498 kronojn. Mia Nordentoft opiniis, ke la kaŭzo estas la manko de informo pri la stoko, kaj sugestis, ke oni enmetu la informon en la hejmpaĝon. Oni finfine decidis, ke ni forigu la paragrafon 2.2.8 kaj rete informu pri la stoko.

**7. Elekto de prezidanto** – Ne estis aliaj kandidatoj. Peter Wraae volonte estis reelektita.

**8. Elekto de estraranoj** – Arne Casper, Bent Jensenius kaj Ileana Schrøder estis reelektitaj.

**9. Elekto de 2 anstataŭantoj.** Ejnar Hjorth kaj Ana Røssum estis reelektitaj.

**10. Elekto de 2 revizoroj kaj anstataŭanto.** Tara Gregers kaj Sven Sandø ne akceptis reelektojn. Oni elektis Jørgen Maniche kaj Bent Martin Muus. Pro manko de pretulo, ni ne povis elekti anstataŭanton.

**11. Jara Asembleo 2019.** Aprilo en Vejle. Eliza Kehlet proponis, ke oni gastu la hotelon Munkebjerg. Ileana Schrøder jam havas kontakton kun hotelo en Vejle.

## 12. Eventualaĵoj

Jytte esprimis sian kontenton pri la nova hejmpaĝo.

Ileana bonvenigis Marco Menichetti de Italio al la kongreso. Marco estis la sola eksterskandinava partoprenanto en la kongreso.

Peter Weide opinias, ke la nuntempa lingvo-politiko ne favoras Danion. Kvazaŭ ni estas "sprogløse verdensborgere" ("senlingvaj mondocivitanoj" – titolo de libro). Li plue informis pri Ekparolu ĉe edukado.net, kie progresantoj povas trovi helpemajn "geonklojn".

**DEA REGNSKAB 2017 - BILANCO 2017**

| Indtægter / Enspezoj | Kr. | Udgifter / Elspezoj | Kr. |
|---|---|---|---|
| Kontingent klubber | 7645 | Administration | 5299 |
| Kontingent individuoj | 9200 | Gebyrer | 1304 |
| DEJO | 400 | UEA og EEU kontingent | 1307 |
| Øvrige indtægter | 2900 | Arrangementer | 5432 |
| Renter | 2963 | Esperanto en Danio | 8092 |
| Libroservo | 498 | | |
| **SUM** | 25778 | **SUM** | 21434 |
| **Overskud 2017** | 2172 | | |
| **Aktiver** | | **Passever** | |
| Obligationer | 85986 | Egenkapital primo | 146795 |
| Libroservo | 53372 | Årets resultat | 2172 |
| UEAkonto | 1134 | Egenkapital ultimo | 148967 |
| Bankindestående | 8475 | Noll kapital ultimo | 57936 |
| Noll obligationer | 57936 | | |
| **SUM** | 206903 | **SUM** | 206903 |

Peter Wraae — Formand — 9/4 - 2018

Finn Østerbæk — Kasserer — 9/4 2018

Regnskabet er gennemgået og fundet i orden

9/4- 2018

Tara Gregers — Revisor

## Deklaro

Okaze de la Jubilea Skandinava Kongreso, festante la 100-jaran datrevenon de la unua Skandinava Kongreso, Dana Esperanto-Asocio, Norvega Esperantista Ligo kaj Sveda Esperanto-Federacio deklaras sian intencon plifortigi la kunlaboron inter si per:

- regulaj skajpkunvenoj inter la gvidantoj aŭ reprezentantoj de la tri asocioj
- instigo de kunlaboro inter siaj junularaj organizoj
- esploro de eblecoj aranĝi komunajn jarkunvenojn, kursojn, ekzamenojn aŭ aliajn fakajn aŭ kulturajn eventojn
- interŝanĝo de informoj pri novaĵoj, reklam-materialoj, lerniloj, stud-metodoj, eldonaĵoj, movadaj, kulturaj aŭ fakaj aranĝoj
- funkciado de komuna retejo esperantonordio.org

Ni esploru, ĉu aliaj nordiaj organizoj, ekzemple el Finnlando kaj Islando, volus aliĝi al nia iniciato.

Oslo, la 11-an de majo

Dana Esperanto-Asocio | Norvega Esperantista Ligo | Sveda Esperanto-Federacio

## Sukcesa kongreso

La 1-a Skandinava Esperanto-Kongreso okazis en Gotenburgo en 1918, sed montriĝis tre malfacile celebri la centariĝon de tiu evento en la sama urbo. Tial oni decidis aranĝi la 2-an SEK sur la pramo inter Kopenhago kaj Oslo inter la 10-a kaj 13-a de majo, kaj tio montriĝis esti tre bona ideo. Oni esperas ripeti tian plurlandan kongreson ĉiun trian jaron.

La ŝipo enhavas kelkajn tre taŭgajn, diversgrandajn konferencoĉambrojn. En unu el ili okazis la ĝeneralkunvenoj de Dana Esperanto-Asocio kaj poste Sveda Esperanto-Federacio, en alia pli granda ĉambro intertempe okazis komuna jubilea aranĝo. Tiu konsistis el prezentado de la landaj Esperanto-historioj de Danio, Norvegio kaj Svedio, sekvata de skeĉo.



La skeĉo ne estis tre profesie aktorita, sed la aktorantoj Jens S. Larsen kaj Finn Østerbæk parolis sufiĉe laŭte kaj malrapide tiel ke la spektantoj povis aprezi la ideon. La skeĉo estas bazita sur la tre fama en Danio "Samlernejanoj", en kiu du viroj erare kredas koni sin el la bazlernejaj jaroj. En nia skeĉo temis pri "Kongresaj konatoj", kiuj erare kredis rekoni unu la alian el la sama kopenhaga Universala Kongreso de Esperanto; sed UK okazis kvarfoje en Kopenhago!

La pramo veturas dumnokte, kaj dumtage estis ekskursoj en Oslo kaj Kopenhago. En Oslo la kongresanoj vizitis fortikaĵon Akershus kaj la urbodomon, kie akceptis ilin la vicurbestrino Khamshajiny Gunaratnam. En Kopenhago estis du ekskursoj, unu kun promeno "En la piedspuroj de Zamenhof" sekvata de havena boat-rondiro, alia pli longa promeno "Esperanto en la publika spaco de Kopenhago". Ni ne kutimas fanfaroni pri tio, tamen Kopenhago efektive ludas tre gravan rolon en la historio de la Internacia Lingvo (ne nur ĉar Zamenhof vizitis la urbon en 1908).

Eble la glatan organizon de la kongreso influis ke la suma nombro de partoprenantoj estis ne pli ol 45. Sed ĝi meritus esti almenaŭ la duoblo de tio.

# Ekspozicio

DEA partoprenis la ekspozicion *Krop-Sind-Ånd* en Kopenhago komence de februaro, kaj kelkaj deĵoris. Kun multaj vizitantoj ni havis diskutojn, kaj estis tri viglaj tagoj. Tiu forumo taŭgas ĉar homoj kiuj vizitas ĝin estas scivolemaj kaj havas tempon diskuti novajn aferojn.

Sur la foto de la maldekstre Betty Chatterjee kaj Peter Wraae.



## Kopenhago

Kunvenoj okazas en la Kulturdomo, Tomsgårdsvej 35, ĉiulunde je la 19.00 horo. Eniru tra la malantaŭa enirejo ĉe la parkejo. Premu la butonon en la dekstra muro por malfermi la pordon aŭ voku 20 27 08 39 aŭ 60 70 79 69.

21. majo: Pro Pentekosto, ne estas programo en KEK.

28. majo: Ekkonu la "konkurantojn" *Volapuko, Ido, Novial kaj Interlingua.* Oni diras ke 98% de la homoj kiuj parolas planlingvon parolas Esperanton. Tamen, pere de la interreto la "konkurantoj" estas pli videblaj ol antaŭe.

4. junio: *Vikipedio.* ni daŭrigas la projekton/programeron kaj ĉiuj estas ege bonvenaj partopreni ĉu aktive ĉu pasive.

11. junio: Ni legas la lastajn, au plej interesajn, artikolojn en la retgazeto *Libera Folio*. Alklaku ĉe: liberafolio.org. La historio de Libera Folio estas legebla en Vikipedio.

18. junio: Babila vespero. Preparo por la somera ferio kaj la ebla partopreno en kongreso(j).




## Cetera Danio

Inter la 30-a de majo kaj la 8-a junio okazos la *Roskilde-festivalo,* kie junaj Esperantistoj laboros.

La 16-an de Junio, la klubo de Aarhus ekskursos en Aalborg.

## Recenzo de du lerniloj

Kial ĉio pri Esperanto devas aspekti tiel fuŝa nuntempe?



Tio estas la unua demando kiu prezentas sin kiam oni vidas *Esperanto-nøglen* (ŝlosilo) kaj *Esperanto: lille grammatik for dansktalende* (gramatiketo) de Peter Weide. La paperkvalito estas modesta. La teksto plenplenas de legmalhelpaj substrekoj, kiuj ne havas sencon depost la formorto de la tajpilo (krom kiel indikilo ke temas pri retligo). En la ŝlosilo la danaj *æ,ø* kelkloke anstataŭiĝis per *ę,ų* kaj la listo de numeraloj dividiĝis sur du paĝojn, tiel ke la ciferoj ne aperas laŭvice. *Systematikken i Esperanto*, eldonita antaŭ pli ol 40 jaroj, impresas multe pli fid-inspire je la unua rigardo.

Apartigi ŝlosilon kaj gramatiketon cetere ŝajnas esti nebona dispozicio. La klasikaj Ĉefeĉ-ŝlosiloj estis A7-formataj por esti malmultekoste sendeblaj perpoŝte kaj por doni impreson pri la malgrandeco de la lernotaĵo. Produkti pli grandan enkondukilon, kiel la ĉi tie recenzatan gramatiketon kun 32 A5-formataj paĝoj, estas pli epokkonforme, sed tiam oni ne bezonas apartan ŝlosilon, kiu ĉiuokaze devas ripeti parton de la materialo. Ambaŭ verkoj enhavas nombron da utilaj retligoj, kiujn alklaki tamen ne utilas, ĉar la verkoj mem ne haveblas bite.

Juĝo pri la lingvoinstrua enhavo, tamen, devas esti favora. La informoj vere estas helpaj al novuloj, kaj la Esperantaj frazoj estas tute korektaj. Kelkloke, tamen, la dana lingvaĵo estas iomete stranga; ekzemple oni facile komprenas "i egen sag" laŭ la kunteksto, sed neniu plentempa danlingvulo uzus tiun esprimon. En la gramatiketo la refleksivo estas multe tro longe traktita: la Esperanta *si* fakte perfekte kongruas kun la dana *sig*, nur necesas atenti ke *sia* aplikiĝas ankaŭ kiam la subjekto estas plurala (ekzemple: Han vaskede sig og tog sit tøj på, sed: De vaskede sig og tog deres tøj på – Ili lavis sin kaj surmetis siajn vestaĵojn).

La traktado de "si" finiĝas per referenco al la koncerna loko en Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko. Tio devus esti aŭ ellasita pro spacokonsideroj, aŭ farita pli-malpli ĉie en la gramatiketo pro plustudaj konsideroj (kaj tiam vere utilus bita versio). La gramatiketo enhavas

kelkajn internajn krucreferencojn, kiuj estas nepre evitindaj en tiel malgranda verko. Ekzemple *-obl, -on, -op* kaj *po* pedagogie same tiom apartenas al la numeraloj kiom la participoj apartenas al la verboj, sekve ili ne bezonas reaperi en la listoj de afiksoj kaj prepozicioj.

**La pardonebleco de nia fuŝemo**

Por kio ni bezonas lingvan diversecon? La lingvoj ja ĉiuokaze evoluas, kaj la kulturo povas diversiĝi interne de unu lingvo, do kial ne simple lasi universalan lingvon estiĝi el la internacia komunikado, surbaze de la plej forta nacia lingvo? Ĉu ne ĉies sola lingvo (sennaciismo) estas multe pli oportuna aranĝo ol ĉies dua lingvo (internaciismo)? Imagu kiom ni povus ŝpari se sufiĉus lerni skribi kaj legi sian denaskan lingvon kaj ne necesus studi fremdajn, ĉar ili estus mortintaj!

Ĉiuj konas tiun argumentadon, kaj ĉiuj prisilentas ĝin: la sennaciistoj ĉar ili ne volas malhelpi la evoluon incitante la emociojn de la popolo, la internaciistoj ĉar ili ne havas konvinkajn kontraŭargumentojn. La rezisto estas lasita al la raci-rezistaj naciistoj, kiuj ridindigas sin mem batalante kontraŭ komunikado kaj klereco. Sed ĉu ne uzado de nur la angla kondukas al "eĥoĉambro", malkomunikado kun aliaj lingvokomunumoj? Sennacistoj povas rebati ke la problemo aŭtomate solviĝos ĝuste per la anglalingviĝo de ĉiuj komunumoj – kaj naciistoj ĉiuokaze adoras eĥoĉambrojn!

Spite la ŝajne senmankan logikon de la argumentado por anglalingva sennaciismo, ni ĉiuj (kaj ne nur esperantistoj) profunde kaj klare sentas ke estas io absolute malĝusta en ĝi. Tamen, kio pravigas tiun senton? Se Esperanto estas la respondo, pli kaj pli evidentiĝas ke ni neniam vere sciis kio estas la demando. Kaj ĝis ni fine komencos kompreni ke ni ne komprenas, kaj sukcese luktos kontraŭ nia propra nescio – ĉio pri Esperanto neeviteble devas esti fuŝa laŭ tiu aŭ alia aspekto.

# Post babilado sekvis agado

Antaŭ proksimume tri jaroj mi per Fejsbuka Mesaĝilo konatiĝis kun la DR-Kongolanda esperantisto Arlain Kizeyidoko, kiu estas unu el la fondintoj de la klubo *Verda Flago* en la urbo Mbanza-Ngongo. Ekde tiam ni ofte babilas kaj interŝanĝas fotojn, kaj tiel ni reciproke informiĝas pri multaj interesaj temoj kaj kompreneble pri niaj kluboj kaj la movada situacio en niaj landoj.


Iun tagon Arlain informis min, ke la membroj ŝatus legi Esperantajn librojn, sed tiuj mankas al ili. Tiam sekvis la demando: "Ĉu vi povus sendi kelkajn al ni?" Mi replikis, ke mi havas librojn legitajn, kiujn mi volus sendi al li, sed pro la nefidinda poŝta servado kaj la multekosta afranko al mi bedaŭrinde ne eblos. Post kelkaj tagoj li informis min, ke li havas kuzon en Bruselo, kies komerco estas la sendado de uzitaĵoj per kontenero de Belgio al Kongolando, kaj la kuzo pretus transporti la librojn al Mbanza-Ngongo. Oni tiel evitus la nefidindan poŝto-servadon, sed restis la problemo transporta inter Kopenhago kaj Bruselo. Venis en la kapon diversaj ideoj pri la solvo de tiu problemo, tamen neniuj el ili estis al mi kontentigaj.

Superfluo da libroj memevidente estis ne nur mia problemo. Aliaj esperantistoj havis la saman problemon. Unu el ili, Peter Wraae estis ricevinta grandan libraron, kiu kuŝadis surplanke ĉe li. DEA kaj KEK ankaŭ havis plurajn kestojn da libroj en la eta oficejo kopenhaga. Do iun tagon parolante pri nia luksa problemo venis en la kapon de Peter la ideo, ke mi kaj li veterigu ĉies librojn al Bruselo.



Antaŭ Pasko Peter kaj mi plenumis la planon. En Bruselo ni tranoktis ĉe Esperantista familio afabla kaj ni liveris la librojn kaj aliajn utilaĵojn al la kuzo de Arlain. Tiujn li sendos per la venonta kontenero, kaj en junio legemuloj en la klubo Verda Flago ricevos ilin.

Tuj post nia reveno al Kopenhago Arlain sendis al mi la jenan mesaĝon (mallongigita):



Tre varmajn kaj verdajn salutojn el la koro de Afriko, precize el DR-Kongo fare de la Klubo Verda Flago en Mbanza Ngungu, kiu estas kampara urbeto en Demokratia Respubliko Kongo. Ĝi situas 150 kilometrojn sudoriente de la ĉefurbo Kinŝaso.

Verda Flago kreiĝis en 1987 kaj ekde tiam produktas multajn esperantistojn el ĉiuj tavoloj de la ĉi-tiea socio. Ni lernas, instruas kaj praktikas Esperanton, sed la tikla problemo estas la manko de Esperantolibroj. Por triamondano el nepagipova lando kies ĉiutaga pano estas malfacile havebla, aĉeti aŭ mendi Esperanto - librojn el Okcidento estas neimagebla iluzio.

Konga proverbo diras: "Se najbara domo brulas, ne estu senkompata, sed alportu vian estingilon. Eble tiu lasta efike estingos la fajron." Tion faris danaj esperantistoj. Pro tio Klubo Verda Flago havos libraron. Niaj membroj esprimas niajn sincerajn kaj profundajn dankesprimojn pro la oferitaj materialoj. La librojn ni racie uzos kaj disponigos al la tuta ĉi-tiea esperantistaro. La libroj ege mankis al ni, nun ni fieras diri, ke ni baldaŭ havos propran bibliotekon, kiu helpos al ni plibonigi kaj plialtigi nian lingvoscion kaj eĉ kleriĝon. Ni kaptas la okazon danki ĉiujn kontribuintojn al tiu grandioza projekto. Ni aparte dankas niajn gesamideanojn Peter Wraae, prezidanto de Dana Esperanto-Asocio kaj Betty Chatterjee pro iliaj sindonemoj, kiuj vojaĝis centojn da kilometroj de Kopenhago al Bruselo por liveri la materialojn al nia konatulo, kiu al ni ĉion baldaŭ alportos.

Ni salutas la naskiĝantan amikecon inter niaj du kluboj kaj pretas sendi la agadraportojn de nia klubo al Danaj esperantistoj kiam eblos. Vivu Dana Esperanto-Asocio, vivu Klubo Verda Flago kaj vivu la universala lingvo Esperanto.

Kiyidioko Mayinda Arlain. Sekretario de Verda Flago Klubo.

Post kelkaj tagoj Arlain sendis al mi la raporton pri la kluba agado. Jen la mallongita de mi versio:

En 2017 estis bona kaj bunta aktivecoj en la klubo Verda Flago.

Instruado: Marto–Junio okazis la unua porkomencanta kurso gvidate de Roger Luzayamo kaj Arlain Kizeyidioko. 7 el la 10 gelernantoj sukcese plenumis la kurson, post kio ili membriĝis en la klubo kaj partoprenis konversaciajn rondojn kune kun spertuloj. Tie la gvidantaro povis taksi la lingvoscion de la novuloj. Notindas ĉi-tie, ke al la klubo tiam mankis taŭgaj lernomaterialoj.




9 el la 12 gelernantoj, kiuj partoprenis la duan porkomencantan kurson, plenumis ĝin entuziasme kaj sukcese. 4 el ili membriĝis en la klubo. La ceteraj 5 gelernantoj enskribiĝis en la progresiga kurso meze de aprilo.

Eksteraj rilatoj: En 2017 la klubo amikiĝis kun la Esperanto-grupo de Lozère, Francio, kiu subtenas la instruadon per la donaco de lernomaterialoj. Pro kontakto kun esperantistoj danaj estis promesita ampleksa libraro.

Kluba vivo: La gvidantaro celas plialtigi la lingvoscion de la membraro per konversaciaj rondoj, en kiuj ĉiuj aktive partoprenas. Pro la landa situacio membroj ne povas partopreni eksterlandajn aranĝojn, tial tiuj rondoj gravas. La klubanoj kelkfoje pritraktas la sociajn aferojn de la membroj, ĉar oni celas solidarece firmigi la ligojn inter la klubanoj.

Mikrokreditoj: Pro la subteno de anonimuloj el Germanio kaj Skandinavio, kaj pro la mikrokreditemo de la membroj, 16 familioj ricevis proprajn akvopurigilojn. La dua mikrokredita projekto celas doni renovigeblan elektro-energion al ĉiuj membroj per la akiro de sunpaneloj.

Certe multaj esperantistoj en aliaj landoj riĉaj havas superabundon da libroj, kaj volus donaci ilin al samideanoj en malriĉaj landoj, se nur ili havus peranton. Dankon al ĉiuj, kiuj iel kontribuis al la projekto.

*Betty Chatterjee*

## Korespondi deziras

Se vi interesiĝas pr korespondo kun japanoj, bonvolu turni vin al:

Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto

Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3

Tokio, Japanio

Skribante al ni korespondo-peton, bonvolu aldoni vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferojn por faciligi nian laboron.

Ni atendas vian afablecon plenumi nian peton.

Kun anticipa danko ni kore salutas vin.

Respondeculo de Koresponda Servo de JEI

*Nobuo Sakurai*

# Nova esplora centro


Je la 10-a horo, dimanĉe la 29-an de aprilo 2018 okazis la malferma ceremonio de la *Esplora Centro pri Eduko kaj Kulturo de Esperanto* en Orienta Liaoning-Universitato. Ĝi estas la unua Esperanto-Centro de Ĉinio. Tion kune atestis pli ol 30 invititaj ĉeestintoj el Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), la estraro de LEA (Liaoning-provinca Esperanto-Asocio, Ĉinio) kaj aliaj sociaj neesperantaj grupoj, interalie reprezentantoj el studentoj, kiuj estas studantaj Esperanton.

Orienta Liaoning Universitato, situanta en la urbo Dandong, Liaoning, estas konstruita laŭ la Rivero Yalu, kiu ligas Ĉinion al la Norda Koreio. Ĉi-jare ĝi ĝuste havas historion de 70 jaroj. De multaj jaroj gvidantoj de la universitato ĉiam priatentas kaj subtenas Esperanton. Inter 2001 kaj 2003 ĝi enkondukis Esperanton kiel nedevigan studobjekton kun 4 studpoentoj. Tiu studpoento tiam estis la plej alta en tiuj universitatoj en la mondo, kiuj havis Esperanto-objektojn. En 2010 ĝi gastigis la 6-an Esperanto-Kongreson de Nordoriento kaj Interna Mongolio de Ĉinio (EKNI). Ĉi-foje prof. d-ro Guo Yongxin, prezidanto de la universitato kaj aliaj estraranoj, refoje donis la plej grandan subtenon al la centro per bonaj kondiĉoj, ekzemple altnivela akcepto de gastoj, la kunvenejo por la ceremonio, oficejo por la centro ktp.



Vic-prof. d-ro Hu Guohong, kiu okupiĝas pri eduko kaj esploro de la angla lingvo, gvidos la centron. "Akcelado" estas fizika kvanto. La "Akcelado" eduka modelo de angla lingvo kreita de li estas alte taksita. Tiucele la universitato fondis por li Instituton de Akceladaj Fremdlandaj Lingvoj. En la ceremonio li esprimis, ke li provos tiun modelon al eduko de Esperanto, krom ke li vaste kunlaboros kun esperantistoj por ke ĝi konstruiĝu hejmo de Esperantistoj, internacia interŝanĝa esplora centro pri Esperanto kaj transformiĝa platformo de atingoj en Esperanto-esploro.

Post la ceremonio sekvis la unua seminario. La paroladojn faris la ĈEL-vicprezidanto Wang Ruixiang, la ĈEL-vicĝenerala sekretario Jiang Limin, la LEA-vicprezidantoj Wu Guojiang kaj Liu Enwei, la eksa vicprezidanto de Liaoning-a Universitato prof. Zhang Wei, la ĝenerala sekretario de Liaoning Instrua kaj Esplora Asocio de Fremdlandaj lingvoj prof. Zhang




Zhiming, la prezidantino de Insituto de Fremdlandaj Lingvoj de Shenyang-a Universitato Prof. Wang Yan kaj la veterana tradukisto Song Yunsheng en esploraj temoj, internacia kunlaboro kaj kulturado de talentuloj. Prof. Liu Zhengkun, prezidanto de LEA, faris resumon. Li diris, ke ekde 2001 jam kvin universitatoj funkciigis la Esperanto-kursojn en la provinco, interalie la asocia Bazo de Esperanto-instruado en Shenyang Konservatorio de Muziko. Por subteni la centron la asocio decidis fondi Esploran Bazon de Esperanto en la Orienta Liaoning Universitato. Li emfazis ke la centro altiras plimultajn junulojn al Esperanto, kaj konstruas bonkvalitan platformon por esploro pri eduko kaj kulturo de Esperanto. Vic-profesorino Xu Jun kaj Vicprofesorino Wang Xiaoyi el Liaoning-a Universitato, docento Pan chengbo el Shenyang-a Universitato kaj la juna entreprenisto Sun Lianshan ĉeestis la seminarion ankaŭ.



Ne mankas internaciaj atentoj. Gratulojn sendis prof. d-ro Mark Fettes, s-ro Lee Jungkee kaj s-ro Huang Yinbao el la estraro de UEA, la eksa UEA-prezidanto Renato Corsetti, la ILEI-prezidanto s-ino Mireille Grosjean, la danlanda komitatanino de UEA s-ino Ileana Schrøder, prezidanto de la Senegala Esperanto-Asocio s-ro Assane Faye, la iniciatinto de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA) s-ro Bert Boon, la komitatano de la franca regiona federacio Espéranto-Limousin D-ro Christian Lavarenne, s-ro Germain Pirlot el Belgio, s-ro prof. Jozef Willem Haazen el Rusio, s-ro Bardhyl Selimi el Albanio, Alessandra Madella el Italio kaj tiel plu. Interalie d-ro Jorge Antonio Leoni de León, direktoro de Instituto pri Lingvistikaj Esploroj de Universitato de Kostariko, esprimis volon kunlabori kun la centro. S-ro Luigia Oberrauch Madella el Italio esperis, ke kontaktoj kaj rilatoj inter Orienta Liaoning Universitato kaj Universitato de Parma povos en ne malproksima estonto iĝi realeco. S-ro Lee Jungkee ĉiam priatentas preparon de la centro kaj kelkafoje donis bonajn proponojn. Krome ĈEL, LEA kaj s-ro Hori Yasuo, eksa prezidanto de KAEM, donacis al la centro librojn. Ĉiuj gratuloj estis voĉlegitaj.








Post la seminario D-ro Hu Guohong, invitis 13 ĉeestintojn kiel la unuajn esploristojn de la centro kaj disdonis al ili atestilojn. Samtempe li esperas ke plimultaj en- kaj eksterlandaj esperantistoj partoprenos en la centro. S-ino Jiao Xiyang, ĝenerala sekretariino de LEA, prezidis ĉiun el la okazoj. Ĉiu ĉeestinto spertis kaj sentis entuziasman servon de volontulinoj el studentoj.

*Wu Guojiang, Vic-prezidanto de LEA, Ĉinio*

# Bona historieto




En februaro mi kune kun 41 aliaj danoj rondvojaĝis Israelon. En Nazareth ni admiris la tre grandan preĝejon Baziliko de la Anunciacio (dane *Bebudelseskirken)* kaj subite ni staris antaŭ mozaikaj tabuloj de diversaj landoj montrantaj la sanktan patrinon. Inter ili ankaŭ unu kun la teksto:

Nia sinjorino de la espero

Patronino de la esperantistoj

Tre ĝojiga travivaĵo por dana esperantistino.

Parenteze: Mi skribis al la landa ĉefdelegito kaj gratulis pro la sukceso.

*Grete Nielsen*



*Danoj, Svedoj kaj Norvegoj en la konferenca salono*
*post la jubilea programo en la pramo inter Oslo kaj Kopenhago*